
LA FAMILIO

PROKLAMO AL LA MONDO

LA UNUA PREZIDANTARO KAJ KONSILANTARO DE LA DEKDU APOSTOLOJ DE LA EKLEZIO DE JESUO KRISTO DE LA SANKTULOJ DE LA LASTAJ TAGOJ

NI, LA UNUA PREZIDANTARO kaj la Konsilantaro de la Dekdu Apostoloj de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj, solene proklamas ke geedzeco inter viro kaj virino estas ordonita de Dio kaj ke la familio estas centra en la plano de la Kreinto por la eterna destino de Liaj gefiloj.

ĈIUJ HOMAĴ ESTAĴOJ – viraj kaj virinaj – estas kreitaj laŭ la bildo de Dio. Ĉiu estas amata spirita filo aŭ filino de ĉielaj gepatroj, kaj tiel, ĉiu havas dian naturon kaj destinon. Sekso estas esenca trajto de individua antaŭmorta, morta, kaj eterna identeco kaj celo.

EN LA ANTAŬ-MORTEMA REGNO, spirit-filoj kaj filinoj konis kaj adoris Dion kiel ilian Eternan Patron kaj akceptis Lian planon, per kiu Liaj infanoj povis akiri fizikan korpon kaj gajni surteran sperton por progresi al perfekteco kaj finfine realigi ilian dian destinon kiel heredantoj de eterna vivo. La dia plano de feliĉo ebligas eternigi familiajn rilatojn trans la tombon. Sanktaj ordonoj kaj interligoj disponeblaj en sanktaj temploj ebligas por individuoj revenon al la ĉesto de Dio kaj por familioj kuniĝi eterne.

LA UNUA ORDONO kiun Dio donis al Adamo kaj Eva apartenas al ilia potencialo por gepatreco kiel edzo kaj edzino. Ni deklaras ke la ordono de Dio por Liaj gefiloj por multiĝi kaj por pleniĝi la teron restas valida. Ni cetere deklaras ke Dio ordonis, ke la sanktaj potencoj de generado estu uzataj nur inter viro kaj virino, laŭleĝe edziĝintaj kiel edzo kaj edzino.

NI DEKLARAS ke la rimedoj per kiuj la mortema vivo estas kreita, estas elektitaj de Dio. Ni asertas la sanktecon de vivo kaj ĝian gravecon en la eterna plano de Dio.

EDZO KAJ EDZINO havas solenan respondecon ami kaj prizorgi unu la alian kaj siajn infanojn. "Infanoj estas

heredaĵo de la Eternulo" (Psalmo 127:3). Gepatroj havas sanktan devon kreskigi iliajn infanojn en amo kaj justeco, provizi liajn fizikajn kaj spiritajn bezonojn, kaj instrui ilin ami kaj servi unu la alian, observi la ordonojn de Dio, kaj esti leĝ-obeantaj civitanoj kie ajn ili loĝas. Edzoj kaj edzinoj – patrinoj kaj patroj – respondecos antaŭ Dio pro la malplenumo de tiuj devoj.

LA FAMILIO estas ordonita de Dio. Geedzeco inter viro kaj virino estas esenca al Lia eterna plano. Infanoj rajtas naskiĝon en la ligoj de geedzeco, kaj esti edukitaj de patro kaj patrino kiuj honoras geedzajn promesojn kun kompleta fideleco. Feliĉo en familia vivo plej verŝajne estos atingita kiam fondita sur la instruoj de la Sinjoro Jesuo Kristo. Sukcesaj geedzeco kaj familioj estas fondiĝintaj kaj teniĝintaj sur la principoj de fido, preĝo, pento, pardono, respekto, amo, kompatato, laboro, kaj sanaj distraj aktivecoj. Laŭ dia plano, patroj devas prezidi en siaj familioj kun amo kaj justeco kaj respondecas por havigi la necesajn de la vivo kaj por doni protekton por iliaj familioj. Patrinoj unuavice respondecas pri la nutrado de iliaj infanoj. En tiuj sanktaj respondecoj, patroj kaj patrinoj devas helpi unu la alian kiel egalaj partneroj. Malkapablo, morto, aŭ aliaj cirkonstancoj povas necesigi individuan adapton. La pligranda familia rondo devus subteni kiam bezonata.

NI AVERTAS ke individuoj kiuj malobservas interligojn de ĉasteco, kiuj misuzas edz(in)on aŭ idaron, aŭ kiuj ne plenumas familiajn respondecojn, iun tagon respondecos antaŭ Dio. Plue ni avertas ke la malintegriĝo de la familio kaŭzos malfeliĉojn al individuoj, komunumoj kaj nacioj kiel antaŭdirite per antikvaj kaj nuntempaj profetoj.

NI ALVOKAS ĉiujn respondecajn civitanojn kaj funkciulojn de ĉiuj registaroj ĉie por apogi tiujn paŝojn celantajn la subtenon kaj fortigon de la familio kiel la fundamentan unuon de la socio.